09.12.09

FERVOJA ESPERANTISTO

Informilo de Germana Esperanta Fervojista Asocio

Mitteilungsblatt der Deutschen Eisenbahner-Esperanto-Vereinigung
in der Stiftung Bahn-Sozialwerk

Fondita 1952 | Numero 4 | Oktobro/Decembro 2009



Loreley: Ausflugsziel unserer Jahresversammlung Foto: Wikipedia

★★★

53-a GEFA-jarkunveno en Bad Ems, 23.-25.10.2009

Kunvenis 30 partoprenantoj, kiuj loĝis en la BSW-hotelo "Haus Lindenbach". Por la ĉefkomisiito Achim Meinel kun estraranoj kaj la distriktkomisiitoj Siegfried Krüger, Manfred Retzlaff, Claŭdia Würker und Karl Heinz Marzahn okazis laborkunsidoj, por la aliaj distra programo.

Vendredo vespere okazis gvidata vingustumado kun s-ro Driesch el Nievern. Li prezentis 6 vinojn kaj konatigis kun la produktado de la vino en la regiono.

Sabato antaŭtagmeze la gastoj partoprenis gvidadon en la fama kaj tradicia urbo, kiun trapasas la Limeso, la plej granda konstrumonumento en Eŭropo. Ĝi estas laŭ decido de Unesco mondheredaĵo.

Sabato posttagmeze sekvis por ĉiuj kombinita bus- kaj ŝipekskurso al Lorelejo en la reijnvalo, kiu inter Rüdesheim kaj Koblenco ankaŭ estas mondheredaĵo. En Kamp-Bornhofen atendis nin ŝipo, kiun ni uzis rejnsupren ĝis Lorelejo kaj reen al St. Goarshausen (1,5 h). Tie atendis nin la aŭtobuso por ŝofori nin supren al la roko Lorelejo (125 m super la rejno), de kie oni havas belegan superigardon rejnvalen. Por viziti la novan informcentron la tempo ne sufiĉis, sed estas ege rekomendinda. La ŝoforo multe informis pri la kasteloj (105 inkluzive de la ruinoj) laŭlonge de la rivero. Ni trapasis la kasteloj Lahneck, Stolzenfels, Martinsburg, Marksburg, Königsstuhl, Boppard, Sterrenberg, Liebenstein, Maus, Katz kaj Rheinfels.

Sabate vespere estis gaja vespero kun muzikisto Michael Woll, dancado kaj lotumado. Dimanĉo antaŭtagmeze ni memoris nian mortinton Horst Theurich kaj ricevis pere de s-ino George de la BSW-estraro aktualajn informojn. Nepre necesas gajni novajn membrojn por la maljuniĝanta BSW-anaro. Estonte la enkasigo de la BSW-kotizo ne plu okazas aŭtomate. Ĉiuj BSW-anoj devas subskribi permeson de enkasigo per banko.

Per lumbildraporto de Bodo Ehrlich pri la IFEF-kongreso en Triesto finiĝis la jarkunvenon. Venontjare ni kunvenos 8.-10.10.2010 en Festenburg (Harz).

Siegfried Krüger



Am Rhein: Meinel, Hoffmann, Würker, Ehrlich (von rechts)
Foto: Siegfried Krüger

53. GEFA-Jahresversammlung in Bad Ems, 22.-25.10.2009

Die Jahresversammlung fand mit 30 Teilnehmern im BSW-Ferienhotel „Haus Lindenbach" am Stadtrand von Bad Ems statt.

Durch Bad Ems geht der Obergermanisch-Raetische Limes, Europas größtes Baudenkmal, das durch die Unesco zum Weltkulturerbe erklärt wurde. Auch das Obere Mittelrheintal zwische Rüdesheim und Koblenz gehört dazu.

Neben Arbeitssitzungen der Vorstandsmitglieder kam auch die Unterhaltung nicht zu kurz, bestehend aus Stadtführung, Weinprobe, kombiniertem Bus- und Schiffsausflug zur Lorelei, Unterhaltungsabend mit Musik, Tanz und einer Verlosung.

Zum Schluss informierte Frau George vom Hauptvorstand des BSW über Aktuelles beim BSW und der Notwendigkeit, neue Spender zu werben. Weil der automatische Einzug der BSW-Beiträge vom Lohn bzw. Gehalt zukünftig entfällt, müssen alle Spender eine Einzugsermächtigung durch die Bank erteilen.

Die nächste Jahresversammlung vom 8. bis 10. Oktober 2010 findet in Festenburg (Harz) statt.

Siegfried Krüger



Frau George vom Hauptvorstand BSW
Foto: Siegfried Krüger

Senioren und Seniorinnen aufgepasst!

Unser Seniorentreffen im Jahre 2010 findet am 28. und 29. April 2010 in Leipzig statt.
Einzelheiten im nächsten Heft.



Koran dankon
pro viaj multaj karaj bondeziroj
je mia (nia) 80-a naskiĝtago.

Rolf Terjung

Nia Prezidanto vizitis jarkunvenojn en Hungario kaj Rumanio

Lau invito de ambaŭ landaj Esperanto-asocioj de la tieaj fervojistoj mi partoprenis la hungaran jarkunvenon en Nyireghaza-Sostofürdö la 4an-5an de julio kaj rumanan la 9an ĝis 11-an de oktobro en kuracloko Tusnad apud Brasovo. Al Hungario mi bedaurinde unu tagon tro malfrue alvenis, ĉar ĝis la vendredon posttagmeze mi estis en Bad Salzuflen en la grava BSW-kunsido de ĉefkomisiitoj.

Kion mi spertis dum la jarkunvenoj?

Unue - kaj kiel kutime inter Eo-fervojistoj - tre agrablan kaj gajan, amikecan etoson dum la tuta arangô. Piedekskurso en Tusnad (kaj autobusekskurso laŭdire tre interesa en Hungario, bedaurinde pro malfruiĝo sen mi.) kaj temparementplenaj (danc-) vesperoj, parte kun tombolo, donis sufiĉe da eblecoj por konatiĝi kun alilandaj gekolegoj. Eĉ sufiĉe da belaj danculinoj ĉeestis la arangojn. Entute tre agrablaj horoj!

Kion mi konstatis krome?

Mankas kiel ankaŭ en niaj GEFA-jarkunvenoj eksterlandanoj: en Hungario krom mi "nur" du ĉeĥoj, inter ili la ĉefkomitatano Tomisek kaj en Rumanio unu junulo el Aŭstrio. Tio signifas, ke oni aŭdas tro ofte "krokodilojn"...

Memkompreneble, partopreno ofte signifas longan alvojaĝon nur por semajnfino, sed tamen mi povas konfesi, ke valoras la partopreno por esti inter gekolegoj alilandaj kaj renkonti malnovajn au konatiĝi kun novaj geamikoj!

Jen, ek al venontjaraj jarkunvenoj en eksterlando! Pri subteno rilate fervojajn liberbiletojn kontaktu la GEFA-prezidanton.

Achim Meinel



Kiom pezas unu kilogramo?

Kilogramo estas la lasta internacia mezurunuo, kiu orientiĝas laŭ objekto. Temas pri 125 jaraĝa platen/iridia briko, kiu kuŝas en volbaĵo en Parizo.

Sciencistoj konstatis fluktuadon en la pezo de tiu objekto. Ili klopodas tial, trovi novan difinon. La bazo devas esti naturkonstanto, kiu anstataŭas la nestabilan objekton.

Fizikistoj ekzamenas, ĉu eblas starigi perfektan globon el pura arĝento. Tiam ili povus fiksi la nombron de atomoj, kiuj egalas kilogramon.

Aliaj esploristoj klopodas difini kilogramon per la magnetismo aŭ gravito. Internacia komitato devas prijuĝi la rezultatojn ĝis la jaro 2011 kaj tiam decidi, kio difinas kilogramon.

Tiam povas la platen/iridia briko en Parizo fluktuadi laŭplaĉe.

(Trovita en "National Geographic" Okt.2009)

Dieter Hartig

KOMUNE NI ELKONSTRUU
Herzberg - LA ESPERANTO-URBON

Jen aparte grava ALVOKO. Ni atendas la eksterordinaran eventon en la Zamenhof-jaro.

Certe vi scias, ke je la 15a de decembro 2009 estos la 150-a datreveno de la naskiĝo de d-ro Ludoviko Lazaro Zamenhof. Dum la UK en Bjalistoko (post la unua prezento de la filmo pri la nova Esperanto-urbo, filmita dum julio 2006 en Herzberg) la fama aktiva esperantisto Roman Dobrzynski el Varsovio (en ĉeesto de eble 300 spektantoj) diris, ke Herzberg - la Esperanto-urbo - estas la plej granda bonŝanca donaco por la tuta Esperanto-movado - ĝuste ankaŭ okaze de la Zamenhof-jaro 2009. Pri nia belega artista Zamenhof-medalo ni jam informis vin. Nemalmultaj esperantistoj plendis, kial en la nova Esperanto-urbo ankorau ne ekzistas Zamenhof-monumento. Nun la sonĝo por multaj realiĝos - ĝuste pro la grava jubileo dato. La urboadministracio kaj la urbestro volonte konsentis kaj la monumento baldaŭ alvenos en Herzberg - la Esperanto-urbo.

Sur ĉ. 0,5 m ŝtuparo (kun fundamento) staros granda nigra marmorŝtono (postamento) alteco 1,00 m, sur kiu staros la 0,85 m alta Zamenhof-busto el blanka marmoro. Ni preparos specialan inaŭguran ceremonion je la 15-a de decembro 2009 en la Esperanto-urbo.

FINANCADO de la Zamenhof-monumento: preparita estas bela kolektinda "Zamenhof-briketo" je valoro de 50 €.

KOMUNA SUBTENO petata: Bv. mendi 1 BRIKETON je valoro de 50€ kun individua numero, stampo kaj subskriboj.

STARLOKO de la MONUMENTO: Parkloko ĉe la akvorado apud federacia strato n-ro 247 kaj piedira zono. Certe okaze de la in-aŭguro (15.12.2009) estos speciala evento kun muziko, kulturo, inaŭgura ceremonio kun posta akcepto en la kavalira salono de la belega kastelmuzeo. La pozitiva informo rilate al speciala festo venis el la urbodomo de la Esperanto-urbo Herzberg.

Vi povas ĝiri la monon (50,00 €) al bankkonto je la asocia nomo:
Esperanto-Gesellschaft Südharz Herzberg;
konto-numero: 101457927, bankindikilo (BLZ): 26351015).



Matematiko per torto

Petro preparas sian naskiĝtagan feston kaj petis sian patrinon baki tiucele beletan torton. Li tre ŝatas helpi, precipe dekoracii la torton.

Unue la rando de la tortosurfaco ricevis frago-dekoracion. Poste li metis ringon el aprikotoj, en la mezo li sorgeme aranĝis dikan ananasdiskon kaj en la truo de la ananaso li amasigis fragomarmeladon, kvazaŭ monteto.

Liaj ses gastoj, lernejamikoj, admiris la artaĵon, kiu nun staras meze sur la tablo kaj invitas, esti manĝata.

„Tranĉu la torton en ses samgrandajn pecojn." petis Petro. La patrino prenis tranĉilon kaj meditis: Ses samgrandajn pecojn? Ŝi demandis: "Ĉu ne prefere 12 pecojn? Tiam ricevas ĉiu du pecojn kaj mi povas tranĉi trans la tuta torto." "Ne, mi preferas ses samgrandajn pecojn."

Nun la patrino tranĉis de la mezo ĝis la rando. Ŝi konstatis, ke la tranĉo estas samlonga kiel la tranĉilo.

Kaj nun? La patrino meditis.

Kion faris la patrino, por ricevi ses samgrandajn tortospecojn?

Diru la solvon en la maldekstran orelon de

Dieter Hartig



Solvo "Matematiko per torto":

La patrino memoris, ke la formulo pri la periferio de cirklo estas d oble π, aŭ duobla radiuso (tranĉilo) oble π.

Per la tranĉil-longo (kaj iom) ŝi faris signon ĉe la rando. Per tiu ceremonio ŝi ricevis ses samgrandajn pecojn.

Wenn Sie uns eine Spende zukommen lassen wollen, hier unser Konto:
Deutsche Eisenbahner-Esperanto-Vereinigung
Konto 953 729 bei der Sparda-Bank Hessen, BLZ 500 905 00

GEFA Nützliche Adressen

Bitte in der in FE 1/09 veröffentlichen Liste folgende Berichtigung vornehmen:

Mitarbeiter Fachwörterausschuss und Verbindung zu DB AG
Bodo Ehrlich,
Knaustwiesen 36, 34130 Kassel
Tel 0160-97473402

Ist die „SB“ schon da?

(Fortsetzung aus FE 3/09)

Einer meiner Kollegen bat mich, ihn zu begleiten. Er wusste, dass seine Wohnung getroffen war. Aber er wollte nicht allein dorthin gehen. Natürlich ging ich mit ihm. Schon von Weitem sahen wir nur noch nackte Wände. Zu unserem größten Erstaunen hörten wir einen Vogel zwitschern. Im dritten Stock hing ein Vogelkäfig mit einem Kanarienvogel. Es war nicht zu fassen. Der kleine Kerl freute sich seines Lebens, zwitscherte nach Kräften und genoss die Sonne. Er war einfach nicht zu befreien, aber wir schafften es. Nach weiteren Problemen verließen wir Magdeburg. Noch stehen mir die Bilder von Magdeburg wie ein Albtraum vor Augen.

Als ich spät abends nach Hause kam, fand ich auf der Treppe meine Schwester mit ihrem Gepäck. Sie war als Wehrmachtshelferin aus Russland auf Heimaturlaub entlassen. Gott sei Dank, nun war meine Mutter nicht mehr allein. Die Sorge war ich los. Meine Schwester überraschte uns mit einer Flasche Eierlikör (Eier und Wodka).

Zwei Tage hatte ich Ruhe. Da kam ein Anruf aus Halle. Die SB aus Köthen brauchte meine Hilfe. Die Leuna-Werke in Merseburg standen in Flammen. Ein Nachzügler hatte seine Bomben auf einer Lumpenfabrik abgeladen. Der Gestank war verheerend Die Kantine, nur mit einem Teerpappedach versehen, war in Gefahr. Sie sollte erhalten bleiben, das Dach wurde gerettet

Drei Tage später saßen wir beim Mittagessen, als die Fensterscheiben klirrten, dann heulten sie Sirenen. Natürlich der Flughafen in Hildesheim. Schon verdunkelten Rauchschwaden die Gegend. In kurzer Zeit war der Flughafen platt gewalzt und die Altstadt ein Flammenmeer. Sie brannte wie Zunder. Ich nahm meine Tasche und fuhr mit dem Fahrrad in Richtung Hildesheim.

Kie estas la „SB“?

(daŭrigata de FE 3/09)

Unu de miaj kolegoj petis min, akompani lin. Li sciis, ke sia loĝejo estis trafita. Sed li ne volis iri tien sole. Kompreneble mi iris kun li. Jam de malproksime ni nur vidis nudaj vandoj. Je nia granda miregho ni aŭdis birdon pepkanti. En la tria etaĝo pendis birdokaĝo kun kanario. Oni apenaŭ povis kredi. La malgranda ulo ĝojis pri sia vivo, pepkantis per la tuta forto kaj ĝuis la sunon. Li simple ne estis liberigebla, sed ni sukcesis. Post pliaj problemoj ni forlasis Magdeburgo. Ankoraŭ nun la bildoj de Magdeburgo staras antaŭ miaj okuloj kiel inkubsonĝo.

Kiam mi revenis hejmen malfruvespere, mi trovis mian fratinon kun siaj pakaĵoj sur la ŝtuparo. Ŝi estis milithelpantino kaj eksigita el Ruslando al hejmlibertempo. Dank al Dio, nun mia partrino ne plu estis sole. Tiu zorgo estis for de mi. Mia fratino surprizis nin per botelo da ovolikvoro (ovoj kaj vodko).

Du tagojn mi ripozis. Tiam venis alvoko el Halle. La SB el Köthen bezonis mian helpon. La Leuna-rafinejo en Merseburg staris en flamoj. Postvenanto estis malŝarĝita siajn bombojn sur ĉifonfabrikon. La odoraĉo estis terura.La kantino, nur ekipita per gudrita kartona tegmento, estis en danĝero. Ĝi estu konservita, la tegmento estis savitigita.

Tri tagojn poste ni sidis ĉe tagmanĝo, kiam tintis la fenestrovitroj, tiam muĝis la sirenoj. Kompreneble la flughaveno de Hildesheim. Jam fumondoj malheliĝis la regionon. En mallonga tempo la flughaveno estis rulpremita plate kaj la malnova urboparto maro da flamoj. Ĝi brulis kiel tindro. Mi prenis mian poŝon kaj veturis per mia biciklo en direkto Hildesheim.

Ich kam nicht weit, schon am Friedhof war alles abgesperrt. Ein Polizist hatte Mühe,
die Massen zurück zu halten. Auch mich ließ er trotz Spezialausweis nicht durch. „Ich nehme Sie mit ins Krankenhaus". Was sich hier bot, ist unsagbar. Alle Eingänge und Flure standen voller Opfer. Meine Hilfe war mehr als willkommen. Was konnte ich schon tun? Ärzteund Schwestern waren total überfordert. Die ganze Nacht war ich bemüht, die Kinder zu beruhigen. Gegen Morgen war ich am Ende, ich wurde bewusstlos. Ein Polizist fuhr mich mach Hause. Bei meiner Mutter wurde ich am besten gepflegt.
Dies war mein letzter, aber schwerster Einsatz. Ich hatte in Hildesheim die Schule besucht und nun viele Freunde und Bekannte verloren. Das muss ich erst begreifen lernen. 70 Jahre habe ich die Ereignisse verdrängt. Nun muss ich meinem Herzen einmal Luft machen!
Ich danke Herrn Dr. Düll, der mit seinen Büchern ermöglicht hat, meine Erlebnisse zu verarbeiten. Herrn Oswald meinen besonderen Dank. Nur mit seinem Computer war es möglich, mein Werk zu Papier zu bringen.

Mi ne venis fore, jam ĉe la tombejo ĉio estis barita. Policisto havis penadon reteni la amasojn. Malgraŭ mia speciala legitimilo li ankaŭ min ne lasis preterpasi. "Mi kunprenas vin al la hospitalo". Kio montriĝis tie estas nedirebla. Ĉiuj enirejoj kaj koridoroj estis plenaj da viktimoj. Mia helpo estis pli ol bonvena. Kion mi ja povus fari? Kuracistoj kaj flegistinoj estis plene tropostuliaj. La tutan nokton mi klopodis kvietigi infanojn. Proksimume mateno mi estis je la fino, mi svenis. Policisto veturigis min hejmen. Ĉe mia patrino mi estis flegitita plej bone.
Tio estis mia lasta sed plej prema engaĝigo. Mi estis vizitata la lernejon en Hildesheim kaj nun perdita multajn amikojn kaj konatulojn. Tion mi devis unue lerni koncepti. 70 jarojn mi subpremis la eventojn. Nun mi devas malŝarĝi mian koron!
Mi dankas s-ron D-ro Düll, kiu ebligis per siaj libroj prilabori miajn travivaĵojn. S-ron Oswald apartan dankon. Nur per sia komputilo estis ebla, surpaperigi mian verkon.

Elfriede Kruse
95-jaraĝa

****

Kalendaro

11.-13.12.2009
Marie-Hankel-Kulturtage in Dresden
Tel. 0351-2030815,

18.12.2009
Centra jubilea Zamenhoffesto en Berlino
infozentrum@esperanto.de

27.12.2009-03.01.2010
26a Internacia Festivalo en Nördlingen
HDP@internacia-festivalo.de^

27.12.2009-03.012010
8a Novjara Renkontiĝo en Saarbrücken
lu.esperantoland@gmx.de

****

Redaktfino por FE 1/2010 estos la 15.02.2010
Stiftung Bahn-Sozialwerk Zentrale Frankfurt am Main
Schriftleitung/redakcio: Fritz Lautenbach, Abtstor 21, 36037 Fulda
Tel. (06 61) 7 76 27, Fax (06 61) 3 02 96 92, E-Mail: fritzlautenbach@gmx.de